# Informilo

Monata revuo de la estraro de FEL - 11a j. n-ro 6, okt. 1991

## Estraro

*Prezidanto:* Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem. Tlf. (03) 440 30 92.

*Instruado:* Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem. Tlf. (03) 239 21 69.

*Financoj:* Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge. Tlf. (050) 33 00 04.

*Sekretario:* Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen. Tlf. (011) 52 19 43.

*Membroj:* Jean Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk. Tlf. (056) 20 07 96.

Peter Berx, Klein Koosterstraat 17, 3570 Alken. Tlf. (011) 31 26 20.

Jan Bovendeerd, Meidoorn 42/2, 2640 Mortsel. Tlf. (03) 449 50 06.

## Komisiitoj

*Financoj:* Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.

*Eldona agado:* Gerrit Berveling, Chris Declerck, Rejna de Jong, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.

*Manlibro de la aktivulo:* Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee. Tlf. (016) 20 14 53.

*Gazetara servo:* Guido van Damme, p/a FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Tlf. (03) 234 34 00.

*Rebata servo:* Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende. Tlf. (059) 70 87 00.

*Prelegvojaĝoj:* Hilde van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst. Tlf. (053) 70 50 11.

# FEL-estraro: protokolo

11a de oktobro 1991

## 1 Financo kaj planado

Ĉeestas: Ivo Durwael, Gerd Jacques, Roland Rotsaert, Jos Vandebergh kaj Paul Peeraerts.

### 1.1 Buĝetkontrolo

La membroj de la komisiono kontrolis la spezokonton kaj la provizoran bilancon sed ne renkontis gravajn deviojn.

### 1.2 Investoj

Regule revenas la ideo ĉu FEL aĉetu maŝinon por la fintraktado (kunigo, faldado, vinktado, tranĉado) de siaj revuoj kaj broŝuroj. La komisiono petas al PP ĝis la venonta kunsido surpaperigi detalojn pri la kvanto de broŝuroj presataj jare, pri la tempinvesto ktp.

## 2 Administra parto

Ĉeestas: La samaj escepte de Gerd Jacques. Aldoniĝas Alex Humet kaj Jean Pierre Allewaert.

### 2.1 Antaŭa protokolo

Neniuj rimarkoj.





### 2.2 Forpaso de Brouwere

Forpasis sinjoro de Brouwere, membro de nia honora komitato. JV proponas ĉi-koncerne ke FEL starigu regulon pri kion fari en tiuj okazoj. Laŭ ID tio ĉi estas tre malfacila kaj vere dependu de la persono honorigata.

### 2.3 Adiaŭo Stefan Maul

Pro la eksiĝo de Stefan Maul kiel ĉefredaktoro de *Monato*, la estraro proponas donaci al li dumvivan abonon de *Monato* kaj de la *Stafeto*-libroj. PP verkos leteron en decembro kaj subskribigos ĝin de la tuta estraro kaj stabanaro.

### 2.4 UK Vieno

La Viena turisma servo pretas helpi kelkajn grupojn kiuj organizas promociajn aranĝojn pri Vieno kaj la UK. ID esploros la eblecojn kaj kontaktos la lokajn grupojn pri tio.

Pri eventuala grupa vojaĝo al Vieno montriĝas kelkaj eblecoj: minibusetoj, Europabus, aviadilo. ID kaj RR esploros kaj havigos informojn.

Al Vieno ID kaj JV iros kiel reprezentantoj de FEL.

### 2.5 Vojaĝo al Ĉeĥo-Slovakio

Grégoire Maertens organizos trajnan vojaĝon por esperantistoj al CS venontjare en majo. Surloke helpos Esperanto-ĉiĉeronoj. Pli da informoj sekvos.

### 2.6 FEL novaĵagentejo

*Gazet van Antwerpen* havas korespondantojn en 20o da landoj. Informojn pri aliaj landoj ili dezirus akiri pere de la reto de kunlaborantoj de *Monato*. Kontrakto pri tio estos farita baldaŭ.

### 2.7 Kampanjo *Horizon-taal*

La kampanjo okazis en Antverpeno kaj Hasselt. En Antverpeno oni disdonis 5000 faldfoliojn kaj pendigis kelkdekojn da afiŝoj . En Hasselt

estis disdonitaj nur kelkcento da faldfolioj kaj pendigitaj kelkdeko da afiŝoj. Pri la rezulto oni scios venontan semajnon.

La kampanjo en Kortrijk (ekster la kadro de *Horizon-taal*) alportis nur du lernantojn.

## 2.8 Nova Esperanto-dokumento

Edward Symoens proponis eldoni novan Nederlandlingvan Esperanto-dokumenton. PP juĝas ĉefe la unuan parton eldoninda kaj traktos plu kun la aŭtoro.

## 2.9 ILEI-ekzamenoj

Estis notitaj 14 aliĝoj (8 por la elementa, 6 por la meza ekzameno). La estraro de FEL atentigas ke sukcesi en tiuj mezaj ekzamenoj rajtigas al la titolo "Kvalifikita instruisto", kio estas necesa por povi instrui. Sukcese fini la 3an jaron de la oficialaj Esperanto-kursoj en Antverpeno ankaŭ rajtigas al tiu titolo.

## 2.10 Venontaj estrarkunsidoj

16a de novembro: Financa komisiono je la 8.30 h., plenkunsido je la 10a horo.[1]

20a de decembro: Financa komisiono je la 17.00 h., manĝo je la 18.30 h.[2], plenkunsido je la 19.30a horo.

## 2.11 Diversaĵoj

### 2.11.1 Budoj en UK

Lui tablon en UK dum 5 tagoj jam kostas 11280 fr. Kvankam ĉiu trovas la sumon tre alta, FEL tamen havu budon ĉiam kiam ni povas trovi la necesajn personojn por deĵori.

[1] Samtage kaj samloke je la 14.30 h. okazas BEF-kunsido.

[2] Estraranoj kiuj ne deziras partopreni en manĝo, bv. averti al PP antaŭ la 18a de decembro.



### 2.11.2 Grupoj

La Kortrejka grupo *La Konkordo* iĝis "reĝa societo".

### 2.11.3 Ekspozicia materialo

La ekspozicia materialo ĉiam iĝas pli kaj pli disfalema. Ni provu trovi tempon por foje inspekti ĝin funde. Ankaŭ ni faru liston de la aferoj kiuj estu kunportitaj al tiaj ekspozicioj.

Estas decidite venontjare denove partopreni en *Het andere boek*.

## 2.12 Eldonpolitiko

En la antaŭa estrara kunveno JV petis meti tiun ĉi punkton sur la tagordo. Kiu estas la celo de FEL? Ĝi estas duflanka:

1. Ligi la Esperanto-parolantojn de Flandrio.

2. Rekte kaj pere de la grupoj varbi pliajn Esperanto-parolantojn.

Ĉu nia eldonpolitiko kadras en tio? Nia eldonpolitiko donas eblecojn por realigi niajn celojn. Ĝi estas subcelo. La eldonoj sukcesas krei strukturon per kiu kreiĝas rimedoj per kiuj eblas atingi la celon.

Iuj sugestas ke la celo de FEL estu helpi al la lokaj grupoj, kio ne okazas sufiĉe. ID listigas parkere kelkajn servojn kiujn la Centro de FEL senpage havigas al la grupoj:

1. Dissendo de informpakaĵoj

2. Disponigo de nia adresaro al la grupoj

3. Admono de nepagintaj membroj, se la grupoj ne kapablas mem fari tion

4. Centra telefonlinio por informoj

5. Libroservo

6. Intervjuoj

7. Programo en *Horizon-taal*

8. Kursoj en *Horizon-taal*

9. Perado de revuoj kaj membroadministrado

10. Liverado de informmaterialo sub kostoprezo

11. Subvenciado de la grupoj (planata)

12. Informoj pri prelegantoj, kadrokursoj, varbado ktp.

AH petos al Pieter Vets fini la dosieron pri la merkatado en FEL.

ID petas al tiuj estraranoj kiuj ankaŭ reprezentas grupon listigi la bezonojn de la grupo ĝis la venonta kunsido.

Estas decidite prepari iun faldfolion "Kio estas FEL?".

Fino de la kunsido je la 23a horo.
Protokolis PP.